

komuna organo de KANSAJA LIGO de ESPERANTO-GRUPOJ KJUŜUA ESPERANTO-LIGO ESPERANTO-LIGO de TYUGOKU kaj SIKOKU

La Movado

komuna organo de KANSAJA LIGO de ESPERANTO-GRUPOJ KJUŜUA ESPERANTO-LIGO ESPERANTO-LIGO de TYUGOKU kaj SIKOKU

Fondita en 1951 N-ro 851 januaro 2022

komuna organo de:

KANSAJA LIGO de ESPERANTO-GRUPOJ
Sone-higasi 1-11-46-204, Toyonaka-si, Ôsaka-hu, 561-0802

KJUŜUA ESPERANTO-LIGO
2-190, Sisaido, Tarami-tyô, Isahaya-si, Nagasaki, 859-0407,
MORIWAKI Yasumasa

ESPERANTO-LIGO de TYUGOKU kaj SIKOKU
Kannonmen 14-1, Kusiki, Kitanada-tyô, Naruto-si,
Tokusima-ken, 771-0371, KITANI Tomoko

ENHAVO

平和といのちを歌って(野田淳子さんインタビュー).....1-2
 楽しい作文教室(125)..... 塚本 猛 3
 Kajero Libervola: Venkis princino Mako
 anonimulo 4
 Rakontetoj el Hamburgo(4)Mariko AOSHIMA 5
 Kurantaj Vortoj(非代替トークンNFT,ほか) 5
 対訳: 源氏物語 第21帖 少女(22) ... 紫式部/belmonto 6-7
 日本昔話(9) 三枚のお札(小僧と山姥) 島谷 剛 8-9
 楽譜: Mi estas Pomo(りんごのひとりごと)
武内俊子/河村光陽/島谷 剛 10
 vidis eksciis sentis: Tigroj gardas templon
 Kuramadera redakcio 11
 初心者のための語尾なし単語の使い方(106) 相川 節子 11
 Pandemio en nova stadio AIKAWA Setuko 12
 La Movado: 吹田エスペラント会の講演会、他13
 Vortkruca enigmo / 作文教室成績 14
 Mikspoto / 作文教室課題 / KLEG事務局だより 15
 編集ノート 16

平和といのちを歌って

シンガーソングライター 野田淳子さんにインタビュー

エスペラントに関心を持ったきっかけは?

1984年のことですが、友人の宝木実さんが書かれた『レジスタンスの青春』という本を読みました。その本で、実さんのお兄さんがエスペラントを学んでおられ、戦争中に監獄に入れられて26歳で亡くなったということを知りました。その頃、有事立法が問題になっていたの、戦争中のように言いたいことも言えない時代になってはいけないという思いで、実さんのお兄さん(寛さん)のことを歌った「時を超えて」という歌をつくり、1987年有事立法反対のつどいで歌いました。この歌の中には「アミーゴは友だち、ムジーゴは音楽、ポポーゴは民衆、パーツォは平和」と、エスペラントの単語を入れました。

エスペラントの集まりで初めて歌ったのは?

1990年、京都で行われた第38回関西大会に声をかけていただき、「時を超えて」など数曲を歌いました。でもその時は、自分もエスペラントを勉強しようという気持ちはありませんでした。難しいと思っていたのです。

では、実際に学習を始めたのはいつですか?

神奈川に「大和おやこ劇場」という鑑賞団体があって、コンサートに招かれて歌っていました。「時を超えて」も歌いました。そこの事務局長の実沢(みさわ)誠



一郎さんが、子ども達にコンサートを届けるのにエスペラントについて知らなくてとは勉強を始められ、横浜で行われたエスペラントの大会に参加されて、わたしにエスペラントで書かれたファクスを送ってこられたんです。それで、わたしも勉強しなくてとはいう気持ちになりました。今、実沢さんは町田エスペラント会の会員です。もし実沢さんが「時を超えて」と出会わなかったらエスペラントの扉を開けないままだったでしょうし、実沢さんがファクスを送ってこられなかったら、わたしもエスペラントの学習を始めていなかったと思います。

具体的にはどんな方法で学習を?

わたしが住んでいる京都では、それまでエスペラント会の例会は夜だけだったのですが、2010年に昼の例会が始まるということを知り、京都エスペラント会に入会しました。そして、2014年に姫路で行われた第62回関西大会で、藤巻謙一さんの通信講座を知り、申し込みました。ずいぶん長くかかって初級を卒業しました。

エスペラントの歌を歌うようになったのはいつからですか？

エスペラントをちゃんと勉強して、エスペラントの歌を歌うようになったのは、2011年に神戸で行われた第59回関西大会からです。この時、エスペラントで作られた歌をみなさんの前で歌わせていただきました。それから、日本大会や関西大会に呼んでいただくようになりました。

エスペラントの集まりと直接関係のないコンサートでエスペラントを歌うようになったのは、2013年の「刻々の誕生」というタイトルのコンサートが始まりです。「刻々の誕生」はこの年に始めて、それから毎年開催しています。また京都のロームシアターで行われた「ヒューマンふれあいコンサート」でも歌いました。そういうコンサートでは、一番をエスペラントで、二番以降を日本語でというふうにしています。一回のコンサートで、だいたい3曲ぐらいはエスペラントを入れます。

エスペラントの歌のCDを出すというのですが
西尾務さんが企画してくださって、エスペラントで歌うアルバムを作ることになりました。収録曲は「ABC」「ハッピー・バースデー」「エーデルワイス」「四季の歌」「故郷（ふるさと）」「今日の日はさようなら」「この道」「遥かな友に」「大きなうた」「死んだ男の残したものは」の10曲です。曲目は西尾さんと相談して決めました。日本と世界の有名な歌をという趣旨のほかに、学習に役立つ歌を、という目的もあります。

わたしが10曲歌ったあとに、全曲のカラオケバージョンが付きます。メロディラインが入っているので、歌いやすいと思います。

大会で歌われたように、伴奏もご自分で？

いえ、佐久間順平さんという、南こうせつのパックで全国を走り回っている人が伴奏しています。この人がクラシックギター、12弦ギター、フォークギターを曲によって使い分け、全曲を伴奏して

くださいました。わたしがちゃんと準備できるように、事前に伴奏を作って音源を送ってくださり、当日もあれこれ直したり、ほんとうに手間と時間をかけてくださいました。10曲を3日間かけて録音しました。

ジャケットの作成などはこれからです。著作権に関する手続きもしています。

CDも作りますが、最初の計画はネットによる有料配信でした。できれば両方を実現したいです。

発音のレッスンも受けたそうですね

エスペラントで歌うために、2012年から沖恵明さんと田平正子さんが発音の指導をしてくださいました。今度のアルバムのためには、西尾さんと松田洋子さんに来ていただき、発音のレッスンを受けました。歌によってはクセがついてしまい、何度も歌ってきた歌ほど発音を直すのが大変でした。

金子みすゞの詩に曲をつけておられますね

今度のアルバムには入っていないのですが、自分で作曲した金子みすゞの詩を21曲歌っています。何曲も、島谷剛さんにエスペラント訳していただきました。

ほかに野田さんの歌をエスペラント訳した方は？

小西岳さんは、横浜で起こった米軍ジェット機墜落事件で犠牲になった母子を歌った「千羽鶴」をエスペラント訳してくださいました。またわたしの作ではありませんが、「地球星」という歌をエスペラントで歌うために belmonto さんにエスペラント訳をお願いしました。

いろいろな方のおかげで、エスペラントで歌うことができ、感謝しています。

持ち歌「大きなうた」について聞かせてください

「大きなうただよ あ山のむこうから…」という出だしのあの歌は、わたしの夫、中島光一が学生時代に作詞作曲したものです。2小節ずつ追いかけて歌えるので、いろいろなつどいやキャンプなどにぴったりで、NHKの「みんなのうた」でも紹介されました。広まり過ぎて、一時期は「作者不詳」扱いをされたこともあります。

この歌は鈴木善彦さんがエスペラント訳してくださいましたが、わたしも中島も、エスペラント訳があることを長く知りませんでした。歌集に載っているのを見てびっくりしました。

(文責 編集部)

La Movado 851



①そのころ日本は好景気だった。

【訳例1】 Tiutempe Japanio prosperis ekonomie. (ヒー坊)

【訳例2】 Tiam Japanio estis en bona konjunkturo. (Eiko, 類似訳: Celejo)

【訳例3】 Japanio ĝuis altan konjunkturaron tiutempe. (CA)

「そのころ」には *tiutempe* (当時) や *tiam* (そのとき)、「好景気」には *konjunkturo* (景気) や、*ekonomio* (経済) が使えます。*konjunkturo* を好況・不況の波と考えれば *alta* (高い)、経済環境と考えれば *bona* (良い) で表現できるでしょう。

訳例1は「経済的に繁栄していた」、訳例2は「良好な経済環境にあった」、訳例3は「好況を享受していた」という表現です。なお、グーグル翻訳では *eksplosi* (爆発する) が出ますが、別の翻訳サイトの *booming* (活況の) を使った英文だとグーグルでも *prosperi* を使ったエス訳になります。

②その会社の社員達は夜遅くまで働いていた。

【訳例1】 La dungitoj de tiu kompanio laboradis ĝis malfrua vespero. (Jasuko)

【訳例2】 La dungitoj de la kompanio laboris ĝis malfrua nokto. (Drako, 類似訳: AG, CA, ヒー坊)

【訳例3】 En tiu ĉi kompanio la dungitoj laboris malfrue en la nokto. (Ivajo) 解説

「社員」は *dungito* (従業員) で表現出来ます。夜は *vespero* (晩、夕方) や *nokto* (夜) でいいでしょう。一応、*vespero* は日暮れ頃から寝る時刻くらいまでで *nokto* は日没から日の出までです。寝る時刻以降は翌朝まで *nokto* です。

訳例3は *en* (～の中で) を使っているの、「この会社では従業員達が～」になり、*ĝis* (～まで) が無いので「夜遅くに働いていた」になっています。*en* は良さそうですが、*ĝis* が無いと夜間業務専門かとも思えます。*ĝis* を追加して *ĝis malfrue* にすればいいのですが、*nokto* のままだと真夜中過ぎまでの感じがします。ひどい状況ですね。

③残業のために毎晩帰宅が遅かった。

【訳例1】 Ili ĉiuvespere malfrue revenis hejmen

pro pluslaboro. (綴り修正: Haveno)

【訳例2】 Ĉiunokte ilia hejmeniro estis malfrua pro ekstra laboro. (AG)

【訳例3】 Pro pluslaboro ili revenis hejmen malfrue en ĉiu nokto. (水渡)

「残業」は *pluslaboro* が考えられます。これは辞書 PIV で法定時間外労働 (*trans la leĝa daŭro*) ネット辞書 ReVo では契約時間外労働 (*pluse al la kontraktita kvanto*) のようです。他に *ekstra laboro* (時間外労働) や *kromlaboro* (副業) を使う場合もあるようですし、一般的な会話では細かい区別はしないと思います。

訳例2は「毎夜、残業のため帰宅につくのが遅かった」、訳例3は「残業のため毎夜深夜に帰宅した」という表現です。*pluslaboro* を複数にする必要は無いと思いますが、複数形にする場合は他の名詞や形容詞との数の一致に注意が必要です。

④でもサービス残業が多く給料は安いまだ。

【訳例1】 Sed la pluslaboro estis preskaŭ senpaga kaj oni ne plialtigis la salajron. (Ivajo)

【訳例2】 Tamen, ne pagita pluslaboro estis multa kaj salajro restis malmulta. (ヒー坊) 解説

【訳例3】 Malgraŭ tio, ilia salajro restis malalta pro nepagita laboro. (Eiko) 解説

【訳例4】 Tamen pro tio, ke senpaga ekstra laboro estas multa, ilia malmulte da salajro ne ŝanĝiĝas. (綴り修正: AG) 解説

「サービス残業」は不払い労働の一種です。賃金支払いの必要のない「おまけ」の仕事のような表現にしても実質は違法行為です。請求自体諦めていましたが、奉仕ではなく単に *senpaga pluslaboro* (無料の時間外労働) で表現出来るでしょう。「安いまま」には *resti* (～のままである) が使えます。

訳例2、訳例3の *nepagita* は「未払いの」という意味です。なお、未払い賃金は請求 *postuli* できますが、請求の時効 *preskripto* は現在3年です。

訳例4は *ke* 節の「不払い超過業務が多い」と、主節の「彼等の少ない給与は変わらない」で表現しています。主語は数量副詞の名詞句ですが、*da* による数量表現なので *ilia* は *malmulte* ではなく *da* の後の被計量語 *salajro* に関連付けられます。被計量語に *la, ilia* のような特定する語は使えません。

成績は p.14、新しい課題は p.15

婚約内定発表から4年、眞子内親王の結婚が実現した。彼女のほんとうの目的は……

Princino Mako, nevino de Tennoo Naruhito, edziniĝis en la 26-a de oktobro 2021. La edzo estas nomata KOMURO Kei, oficisto de jura oficejo.

Ili konatiĝis kiel studentoj de sama universitato kaj ekamis unu la alian. En majo 2017 oni publikigis, ke ili gefianciĝos. Japanianoj multe ĝojis kaj elkore gratulis la junan paron. Kei estis nek altranga nek riĉa, li estis filo de simpla laboristino, sed tio tute ne estis grava. Lia patro estis jam forpasinta kaj nun la patrino estis vidvino, sed ankaŭ tio ne malhelpis gratulemon de la popolo. Amo inter nobla princino kaj simpla oficisto estis rigardata kiel romantika historio.

Se la afero glate irus, ili fariĝus gefianĉoj kaj poste geedziĝus en la sekva jaro 2018. Tamen... en decembro 2017 en unu semajna gazeto aperis artikolo pri la patrino de Kei. Ŝi havis konflikton kun sia eksfianĉo. Jes, ankaŭ la patrino havis fianĉon, sed ŝia fianĉineco estis nuligita. La eksfianĉo postulis repagon de mono, kiun li pruntis al ŝi, sume 4 milionoj da enoj.

Povas okazi, ke viro memvole donacas monon aŭ multekostan gemon al amata virino kaj post malapero de la amo deziras repreni la donacitaĵon. Sed en tiu kazo la patrino mem petis prunti monon aŭ por ĉiutaga vivo aŭ por studo de la filo. La fianĉo de la patrino iom post iom sciis, ke ŝi estas postulema kaj emas pli lukse vivi ol ŝia enspezo permesas.

Iuj opiniis, ke la patrino ne taŭgas esti parenco de tennoa familio, kaj tial Kei devas mem nuligi la fianĉinecon. Aliaj opiniis, ke la filo ne kulpas nek respondecas, eĉ se la patrino havas ian problemon.

Estis ankaŭ diskuto, ĉu "prunto" vere ekzistis aŭ ne. La eksfianĉo ne havis paperon pri la prunto, do atestilo mankis. La patrino asertis, ke la mono estis donaco kaj ŝi ne havas devon repagi. Sed almenaŭ parto de la popolo opiniis, ke ŝi devas repagi la monon uzita por studo de sia filo, ĉu pruntita, ĉu donacita.

Kiam gazetoj traktas geedziĝon de tennoa familio, ili ĉiam aperigas favoran artikolon. Sed rilate al Kei kaj Mako sinsekvis kritikaj artikoloj. Gefianĉiĝo estis prokrastita. En 2018 Kei translokiĝis al Novjorko por tri jaroj. Oni diras, ke Mako kaj Kei interparoladis per interreto kaj ilia pasio ne malfortiĝis malgraŭ trijara diseco.

En 2020 princo Humihito, la patro de Mako, diris en intervjuo de sia naskiĝtago, ke li permesas ilian geedziĝon, ĉar la konstitucio indikas, ke geedzeco estu bazita nur sur la interkonsento de la du seksoj. Sed li diris ankaŭ, ke certa parto de la popolo ne aprobas la geedziĝon, oficialajn ceremoniojn okazigi li ne povas. Li deziris, ke Kei klarigu pri problemoj de sia patrino.

En aprilo 2021 Kei publikigis longan skribaĵon (28-paĝan!) pri la afero. En ĝi li asertis, ke la mono estis donacita kaj li ne havas devon repagi ĝin.

Supozeble Kei intencis diskonigi sian pravecon, sed la skribaĵo vekis plian antipation. Multaj rigardis lin sendankulo.

En rezulto Mako kaj Kei geedziĝis nur per registriĝo de koncerna oficejo sen iaj ceremonioj. En la tago de edziniĝo Mako mem malkaŝis, ke la skribaĵo kaj lia translokiĝo al Usono okazis laŭ ŝia deziro. Li preparis, ke Mako povu vivi ekster Japanio.

Tio vere surprizis multajn homojn. Nun riproĉaj rigardoj al Kei estas direktataj ankaŭ al Mako. La reĝisoro estis la princino!

Post ĉio ili nun vivas en Novjorko. Verŝajne Mako venkis plenuminte sian deziron forlasi tennoan familion kaj vivi ekster Japanio.

Rakontetoj el Hamburgo(4)

— Semaforo-koalicio —

Mariko AOSHIMA (Germanio)

En Germanio estis elekto en septembro kaj gajnis SPD (social-demokrata partio). Ili decidis koalicii kun Grüne (verda partio) kaj FDP (liberal-demokrata partio). Germanaj politikaj partioj havas siajn simbol-kolorojn. Ekzemple; SPD havas ruĝan, Grün havas verdan, FDP havas flavan. Pro tio oni nomas ilin semaforo-koalicio. Cetere opozicioj, kiel CDU (kristo-demokrata partio) havas nigran, Linke (maldekstra partio) havas rozan, AfD (alternativo por Germanio, ultradekstra partio) havas bluan ktp.

Hieraŭ ili malkaŝis, ke ili interkonsentis kaj montris la koaliciajn kontraktojn. Jen estas kelkaj punktoj;

— rapidigi CO₂-reduktojn ĝis 1,5% de pariza kontrakto, 2030 estu sendependa de karbonenergio por klimato

— rapidigi diĝitigon

— minimuma salajro po horo 12€

— altigi salajrojn por flegistoj, pli da flegistoj el eksterlando, plimulti kaj bonigi lernadon — praktikadon — eblecon

— ne altigi impostojn, ne nova ŝuldo de ŝtato kaj aliaj temoj

Olaf Scholz estos nova kanceliero, Robert Habeck estos vic-kanceliero kaj ministro por ekonomio kaj klimato, Annalena Baerbock estos ministrino por eksterlandaj rilatoj, Christian Lindner estos financministro, Hubertus Heil (SPD) restos ministro por laboro. Ministro por digitaligo kaj trafiko estos Volker Wissing (FDP). Marco Buschmann (FDP) estos jura ministro. Christine Lambrecht (SPD) eble por ministrino por enlanda rilato. Aliaj ministroj kiel defendo, agrikulturo, familio, mediprotektado, edukado ktp. ankoraŭ ne estas deciditaj. Kaj oni ankaŭ esperas, ke Karl Lauterbach (SPD) estu ministro por sano, sed

La Movado 851



foto: <https://i0.web.de/image/730/36374730, pd=2,f=content-xxl.jpg>

La foto de maldekstre, A. Baerbock (Grün), R. Harbeck (Grün), O. Scholz (SPD), C. Lindner (FDP)

li ne volas vere...

La nova registaro havas malfacilajn taskojn por efektivaĵoj kontraŭ kronvira pandemio, terovarmiĝo, amasoj da fuĝintoj el mezaziaj kaj afrikaj landoj kaj aliaj. Kelkaj kontraktoj estas malfacile realigeblaj kaj negocieblaj. Ekzemple devigo de vakcinado por ĉiuj ekde 12-jaraĝuloj (kontraŭ pandemio). Rapideco-limigo de aŭtoŝoseoj (mediprotektado), imposto-altigo por riĉuloj (kontraŭ la malegaleco inter riĉaj kaj malriĉaj) kontraŭas FDP. Kiel funkcias sen altigi imposton, financi diĝitigon de lando, investi por teknikoj, edukadoj, trajnvojoj...

La opozicia partio, CDU, diris, ke la kontraktoj ŝajnas ne la celo, sed la revo. Tio ja montras ke kompromiso daŭros longe. Tamen ni ne havas sufiĉe da tempo por atendi. En Germanio neniam ekzistis tri-partia koalicio. Estas unua eksperimento. Mi esperas ke ĝi iel funkcios.

Kurantaj Vortoj

非代替トークン(NFT) ne-interŝanĝebla ĵetono
ヒトパピローマウイルス homa papiloma viruso
ニュー(N v)、クサイ(Ξ ξ)、オミクロン(O o)
nuo, ksio, omikrono

El “Rakontaro Genĝi”, 11-a jarcento

21 Dancistinoj – Wotome – (22)

源氏物語 第21帖 少女をとめ

eljapanigis belmonto

33) Rokudeŭvin estas preta

En la luna aŭgusto la palaco *Rokudeŭvin* estis finkonstruita, kaj *Genĝi* planis transloĝiĝon de la virinoj. La sudokcidenta kvartaletio origine estis la malnova palaco de la Mikadino Mumeo, kaj tial tiu estis decidita kiel ŝia loĝejo. En la sudorienta kvartaletio *Genĝi* loĝos. La nordorienta kvartaletio estis por Falanta Floro, kaj la nordokcidenta estis planata kiel la loĝejo por la sinjorino de *Akaŝi*. De antaŭe lokitaj montetoj kaj lageto estis rompigitaj ŝove al aliaj konvenaj lokoj, kaj laŭ plano ŝanĝante atmosferon de lageto kaj figuron de montetoj oni rearanĝis ilin por ke tiuj plaĉu al la loĝontinoj.

En la sudorienta kvartaletio oni metis monteton alte, kaj plantis printempajn arbojn. La sceno de la lageto estis speciale interesa, kaj en la bosko proksima al la domo oni plantis ne nur kvinpinĝlan pinon, ruĝan mumeon, sakuron, visterion, kerion^{*1}, vakcinion^{*2} kaj aliajn, kiujn oni amuzos en la sezono, sed ankaŭ tiujn de la aŭtuno de loko al loko. En la kvartaletio de la Mikadino oni plantis acerojn pli dense ekflorontajn sur la monteto origine situanta tie, fluigis fontakvon de malproksima loko, aldone metis rokojn por ke la cirkulanta rivereto sonoru pli fascine, kaj elfaris akvofalon tiel —

oni konstruis aŭtunan kampon tre vaste, ĝuste taŭga al la aŭtuna sezono, kun pompaj ekfloroj de aŭtunaj plantoj kaj herboj. La fama vidinda loko *Ofovi* en *Saga* estos malpli aprezinda en ĉi tiu aŭtuno.

La nordorienta kvartaletio havis friskan fonton, kaj estis ordigita laŭ somera sceno. En la bosko proksima al la domo oni plan-

八月にぞ、六条院造りはてて渡りたまふ。未申(ひつじさる)の町は、中宮の御旧宮(ふるみや)なれば、やがておはしますべし。辰巳(たつみ)は、殿のおはすべき町なり。丑寅(うしとら)は、東(ひむがし)の院に住みたまふ対の御方、戌亥(いぬみ)の町は、明石の御方と思しおきてさせたまへり。もとありける池山をも、便(びん)なき所なるをば崩しかへて、水のおもむき、山のおきてをあらためて、さまざまに、御方々の御願ひの心ばへを造らせたまへり。

南の東(ひむがし)は山高く、春の花の木、数を尽くして植糸、池のさまおもしろくすぐれて、御前(おまへ)近き前栽(せんざい)、五葉(ごえふ)、紅梅、桜、藤、山吹、石躑躅(いはつつじ)などやうの、春のもてあそびをわざとは植糸で、秋の前栽(せんざい)をばむらむらほのかにまぜたり。中宮の御町をば、もとの山に、紅葉(もみぢ)の色濃かるべき植木どもをそへて、泉の水遠くすまし、遣水(やりみづ)の音まさるべき巖(いはほ)たて加へ、滝落として、

秋の野を遙(はる)かに作りたる、そのころにあひて、盛りに咲き乱れたり。嵯峨(さが)の大堰(おほみ)のわたりの野山、むとくにけおされたる秋なり。

北の東(ひむがし)は、涼しげなる泉ありて、夏の蔭によれり。前近き前栽、呉竹(くれたけ)、下風(したかぜ)涼しかるべく、木(こ)高き森のやうなる木

tis henonbambuon^{*3}, por ke vento trablovu malvarmete, kaj altaj arboj estis tavole metitaj interese kvazaŭ arbaro. La sceno estis simila al montovilaĝo, kaj la plektobarilo el krenea deŭzio^{*4} ĉirkaŭis la domon intence, kaj plantitaj estis *taĉibanoj*, kiuj rememorigas malnovan tempon^{*5}, diantoj, rozoj, *kutani*^{*6} kaj aliaj, kaj inter ili estis displantitaj printempaj, aŭtunaj arboj kaj plantoj. En la orienta parto de la kvartaletto oni konstruis la domon por ĉevalkonkurenco kun barilo laŭvoje, por ke oni povu spekti ĉevalludon en la maja sezon-festo. Ĉe la bordo de la lageto oni dense plantis akorojn^{*7}, kaj ĉe ties transa bordo ĉevalejo estis konstruita, kie oni bredas bonajn ĉevalojn.

La nordokcidenta kvartaletto havis kotmuron ĉe la norda rando kaj dividitaj en partojn; estis la sekcio de mazagenoj. Ĉe ĝia limo estis muro kun multe da pinarboj, por ke oni aprezu neĝan scenon.

Oni transplantis plektobarilon de krizantemoj sur kiuj brilos roseroj en matenoj en la komenco de la vintro, multajn kverkojn en pompa ekfloro, kaj ne konatajn arbojn el profundaj montoj. (daŭrigota)

- *1 kerio = unu el la plantoj. *Kerria japonica*. 山吹.
- *2 vakcinio = unu el la plantoj. *Vaccinium praestans*.
- *3 henonbambuo = *Phyllostachys nigra var. henonis*. 呉竹, 淡竹.
- *4 krenea deŭzio = *Deutzia crenata*. 卯の花, 卯木, 空木.
- *5 cito el la utaaro *Kokin*.
- *6 *kutani*: pri ĉi tiu floro estas kelkaj opinioj, ke ĉi tiu estas 1) genciano, 2) rokvisterio 岩藤, aŭ 3) speco de peopio 牡丹.
- *7 aŭ japana irido.

源氏物語 “Rakontaro de Genĝi” 第一部
belmonto 訳。第1帖「桐壺」～第20帖「朝顔」 ↗

Kindle 版 vol.4 ~ 7
(第21帖「少女」～第41帖「幻」)

ども木(こ)深くおもしろく、山里めきて、卯花(うのはな)の垣根(かきね)ことさらにしわたして、昔おぼゆる花橘(はなたちばな)、撫子(なでしこ)、薔薇(さうび)、くたになどやうの花くさぐさを植えて、春秋の木草、その中にうちまぜたり。東面(ひむがしおもて)は、分けて馬場殿(むまばのおとど)つくり、埒結(らちゆ)ひて、五月(さつき)の御遊び所にて、水のほとりに菖蒲(さうぶ)植えしげらせて、むかひに御廄(みまや)して、世になき上馬(じょうめ)どもをとのへ立てさせたまへり。

西の町は、北面(きたおもて)築(つ)きわけて、御倉町(みくらまち)なり。隔ての垣に松の木しげく、雪をもてあそばんたよりによせたり。

冬のはじめの朝霜むすぶべき菊の籬(まがき)、我は顔なる柞原(ははそはら)、をさをさ名も知らぬ深山木(みやまぎ)どもの、木深きなどを移し植えたり。
(つづく)



Tri Amuletoj (Knabo kaj Monstrino)

rerakontis SIMATANI Takesi

Antaŭ multaj jaroj maljuna Bonzo kaj novica Knabo vivis en templo ĉe piedo de monto. Iun tagon la Knabo rimarkis, ke abunde fruktas kaŝtanoj en la monto. Li volis kolekti ilin en la monto. La bonzo tamen ne permesis lin iri en la monton, ĉar tie kaŝas sin Monstrino. La Knabo persistis pri sia plano kaj fine la Bonzo donis al li tri amuletojn.

“Kiam aperos Monstrino, ili plenumos vian peton.”

La Knabo kolektadis kaŝtanojn tro absorbite kaj neglektis reiri antaŭ ol sunsubiro. Kiam li perdis vojon en mallumo, aperis maljunulino kaj lasis lin loĝi en sia domo.

Noktomeze vekigis la Knabo. Li aŭdis, ke oni akriĝas tranĉilon per ŝtono en apuda ĉambro. “Ĉu vinagrita viando aŭ supo kun misoo*? Maljuna Bonzo estas tro fibreca, sed la Knabo estas mola kaj dolĉa.”

“Ne bonkora maljunulino, sed Monstrino ŝi estas!” Rimarkis la Knabo. Antaŭ la elirejo sidis la Monstrino. La Knabo serĉis pretekston por forkuri.

“Avinjo, ventro doloras al mi. Mi volas uzi necesejon.” Petis la Knabo.

La Monstrino lasis lin iri al la necesejo. Li estis ŝnurita ĉe la talio por preventi forkuron.

“Revenu plej baldaŭ post la afero!”

En la necesejo la Knabo tuj liberigis sin de la ŝnuro kaj ligis ĝin al kolono. Sur la kolonon li etikedis kaj forkuris.

“Kiam vokos la Monstrino, bonvolu respondi anstataŭ mi.”

Ĉar la Knabo ne revenis, urĝis la Monstrino. “Elvenu rapide!”

“Pardonu, Avinjo, atendu iom da tempo.” La amuleto respondis en la voĉo de la Knabo.

“Elvenu rapide!” “Atendu iom pli!” “Kiam vi finos la aferon?!” “Atendu iom da tempo, mi

三枚のお札 (小僧と山姥)

島谷 剛 再話

昔々、山のふもとのお寺に和尚さまと小僧が住んでいました。ある日、小僧は山に栗がたくさん実ったのを見て、拾いに山へ入りたいと思いました。ところが和尚さまは、山姥(やまんば)がいるから山に入ってはいけないと言います。それでも、どうしても山に入りたいという小僧に、和尚さまは三枚のお札を渡しました。

「山姥が出たら、お札に願い事を言いなさい」

山に入った小僧が夢中になって栗を拾っている間に日が落ちてしまいました。暗い山の中で道に迷っていると、老婆が現れて、自分の家に泊めてくれました。

小僧は夜中に目を覚ましました。隣の部屋で包丁を砥石で研ぐ音がしています。「なますにすべえか、味噌*煮にすべえか。和尚なら筋が多いが、小僧は肉が柔らかくて旨かろう」

「親切なおばあさんと思ったら、山姥だったんだ」と小僧は気づきました。出口の前には山姥がいます。小僧は逃げる口実をさがしました。

「おばあさん、お腹が痛いので廁をかしてください」と小僧は頼みました。

山姥は小僧を廁へ行かせましたが、逃げられないように腰に縄をつけました。

「用がすんだら、すぐに戻るんじゃぞ」

小僧は廁に入ると、腰の縄をほどいて、身代わりに柱に縛りつけ、お札を一枚貼って、逃げ出しました。

「山姥が呼んだら、かわりに返事をしてください」

小僧が帰ってこないで、「早よ出んか」と山姥はせかしました。

「すみません、おばあさん、もう少し待ってください」と小僧の声でお札が答えます。

「早よ出んか」「もう少し」「いつまでかかるんじゃ」「もう少し待ってください」

petas!”

Fine la Monstrino piedrompis pordon de la necesejo. Ne estis la Knabo kaj diris la amuleto: “Atendu, mi petas.”

En furiozo la Monstrino disŝiris la paperon kaj ekkuris post la Knabo. Rapidis la Monstrino. Ŝi preskaŭ kaptis la Knabon, kiu jam kuris duonon de vojo al montpiedo.

La Knabo ĵetis duan amuleton kaj kriis: “Aperu rivero, profunda rivero!” Inter la Knabo kaj la Monstrino ektorentis granda kaj profunda rivero. La Monstrino kun la buŝo ĉe la fluo glute kaj glute eltrinkis tutan riveron. Ŝi rekuris post li.

La Knabo ĵetis la trian kaj kriis: “Aperu fajro, granda fajro!” Inter la Knabo kaj la Monstrino estis kovrita de fajro. La Monstrino elspulis la akvon de glutita rivero. Dume la Knabo enkuris en la templon.

“Mia majstro, venos Monstrino post mi! Savu min, mi petas!”

La Bonzo kaŝis la Knabon en grandan vazon por misoo kaj ĉe enplanka fajrejo ekkuris rizkukon.

La Monstrino postkuris la Knabon kaj venis al la templo. “Hej Bonzo, transdonu la Knabon! Kvankam malaperis lia odoro, mi vidis lin enkuri en vian templon.”

“Tro hastas vi! Oni diras, ke vi praktikas magion. Ĉu vi tamen superos mian ekzorcon?”

En tiu momento grandiĝis la Monstrino. Knalis firsta trabego de la templo premata de ŝia dorso.

“Certe vi scias grandiĝi. Sed vi eble ne povas fariĝi malgranda. Eta kiel grajno de pizo?”

La Monstrino ŝrumpis kaj fariĝis eta pizo. La Bonzo prenis la grajnon kaj maĉe manĝis ĝin enŝovitan en moĉion**.

Por kelkaj tagoj la Bonzo sentis sin malbone pro la bizara manĝaĵo. Cetere tiam vilaĝanoj evitis la Knabon pro odoro de misoo.

*misoo: japana kondimento el fermentintaj sojfaboj k.a.

**moĉio: kuko el rizo.

とうとう山姥は厠の戸を蹴破りました。小僧はいません。「もう少し待って」と柱に貼ってあるお札が言いました。

山姥は怒ってお札を破り捨て、小僧を追いかけました。足が速いので、ふもとへの道を途中まで逃げていた小僧にたちまち追いつきました。

小僧は二枚目のお札を投げて叫びました。「川出ろ、深い川出ろ」山姥と小僧の間に大きな深い川が現れました。でも山姥は川に口をつけると、ごっくん、ごっくんと飲み干してしまい、また追いかけてきました。

小僧は三枚目のお札を投げて叫びました。「火出ろ、大きな火出ろ」山姥と小僧の間は火の海になりました。山姥は、さっきの川の水を吹き出して火を消してしまいました。そのあいだに小僧はお寺に逃げ込みました。

「和尚さま、山姥に追いかけられています。お助けください」

和尚さまは小僧を大きな味噌壺に隠すと、囲炉裏で餅を焼き始めました。

山姥は小僧を追いかけて寺までやって来ました。「やい坊主、小僧を出せ。小僧のにおいは消えたが、お前の寺に駆け込むのを見たぞ」

「まあ落ち着け。山姥どんは妖術を使うというが、さて、ワシの法力にかなうかな？」

たちまち山姥は大きくなりました。背中がつかえて寺の太い棟木がミシミシと軋みました。

「なるほど、山姥どんは大きくなれるのじゃな。それでも小さくは、例えば豆粒にはなれんかもな」

山姥は縮んで、小さな豆になりました。和尚さまは豆をつまむと餅**に挟んでむしゃむしゃと食べてしまいました。

和尚さまは変なものを食べたので、気分が悪くなりました。小僧は味噌のにおいが何日も抜けず、村人からつまはじきにされたそうです。

*味噌：日本の調味料。醗酵させた大豆などから作る。

**餅：米をこねた食物。

Mi estas Pomo (りんごのひとりごと)

muz. KAWAMURA Koyoo(1897-1946), poez. TAKEUTI Tosiko(1905-1945), trad. SIMATANI Takesi



1) Es-tas mi a-ro-ma kaj fre-ŝa ru-ĝa pom' Ve-nis mi de fro-sta kaj nor-da re-gi-on'
2) Venis ni al ven-de-jo, ve-nis al kvar-tal' O-ni fro-tis nin, kvazaŭ es-tus ni me-dal'
3) A-vo por pom-ar-boj la - bo-ras en a - rom' Ki-el far-tas vi di-li - gen-ta kun re-nom'?



En kes-ton o-ni me-tis nin sub la ĉi-el' Ni ku-ris kun lo-ko-mo - ti-vo al la cel'
An-taŭ ven-de-jo si-das ni en ko-lek-tiv' Ku-ŝas hejm-lo-ko en la blu-a pers-pek-tiv'
Ĉu po-mojn ŝto-pas vi en keston kun fi-er'? Ĉu en la - bo-ro kan-tas vi sub la ĉi - el'



Kaj ni al-ve-nis al ba - za-ro kun es-per' Po-mo, po-mo, po - mo Po - mo so -
Ti - e pom-ar-boj sta-ras vi - ce sur dek-liv'
Ĉu vi ri-po-zas, A - vo, bor-de de ri-ver'?



pi - ras hejm-lo - kon Ru - ĝas la ves - per'

りんごのひとりごと

Mi estas Pomo

作詞 武内俊子 (1905-1945)、作曲 河村光陽 (1897-1946)

tradukis SIMATANI Takesi

- 1) 私は真っ赤なりんごです
お国は寒い北の国
りんご畑の晴れた日に
箱につめられ汽車ぼっば
町の市場へつきました
りんご りんご りんご
りんご 可愛い ひとりごと
- 2) くだもの店のおじさんに
お顔をきれいにみがかれて
皆んな並んだお店先
青いお空を見るたびに
りんご畑を思い出す
りんご りんご りんご
りんご 可愛い ひとりごと
- 3) 今頃どうしているかしら
りんご畑のお爺さん
箱にりんごをつめながら
歌をうたっているかしら
煙草をふかしているかしら
りんご りんご りんご
りんご 可愛い ひとりごと

- 1) Estas mi aroma kaj freŝa ruĝa pom'
Venis mi de frosta kaj norda region'
En keston oni metis nin sub la ĉiel'
Ni kuris kun lokomotivo al la cel'
Kaj ni alvenis al bazaro kun esper'
Pomo, pomo, pomo
Pomo sopiras hejmlokon Ruĝas la vesper'
- 2) Venis ni al vendejo, venis al kvartal'
Oni frotis nin, kvazaŭ estus ni medal'
Antaŭ vendejo sidas ni en kolektiv'
Kuŝas hejmloko en la blua perspektiv'
Tie pomarboj staras vice sur dekliv'
Pomo, pomo, pomo
Pomo sopiras hejmlokon Ruĝas la vesper'
- 3) Avo por pomarboj laboras en arom'
Kiel fartas vi diligenta kun renom'?
Ĉu pomojn ŝtopas vi en keston kun fier'?
Ĉu en laboro kantas vi sub la ĉiel'?
Ĉu vi ripozas, Avo, borde de river'?
Pomo, pomo, pomo
Pomo sopiras hejmlokon Ruĝas la vesper'



Tigroj gardas templon Kuramadera

redakcio

En kulturo orient-azia troviĝas "dek du jarbestoj", kaj la jarbesto de 2022 estas tigro.

Oni vidas paron da ŝtonaj bestoj en ŝintoisma aŭ budhisma templo. Ili estas nomataj "koma-inu (korea hundo)", sed la figuro



montras imagitan beston simila al leono. Ili gardas la sanktejon kontraŭ nevideblaj malbonaj estaĵoj. Unu besto sidas kun malfermita buŝo kaj la alia kun fermita buŝo.

En la urbo Kioto estas multaj temploj. Unu el ili, Kurama-dera, estas konata pro tio, ke Minamoto-no Yositone loĝis tie en sia infaneco. Ankaŭ tie troviĝas koma-inu, sed ne leon-simila. La paro en Kurama-dera estas tigroj. En la templo tigro estas rigardata kiel sankta besto. Antikvaj japanoj ne konis tigron, sed bone sciis pri ĝi pere de koreoj kaj ĉinoj.



初心者のための

語尾なし単語の使い方 (106)

相川 節子

相関詞 (40) kiom (続き)

前号で、Kiom da jaroj la infano havas? という例文では jaroj が対格にならないと書きました。kiom から少し脱線しますが、次の例文をごらんください。

Mi aĉetis tri librojn en la Zamenhofa Festo. Nun mi legas unu el la libroj.
(ザメンホフ祭で本を3冊買いました。そのうちの1冊を今読んでいます)

この例文で、2行目の libroj に対角語尾 -n をつけたくなる人はいないと思います。legas の目的語は libroj ではないとすぐわかるからです。この文の目的語は unu です。unu は品詞語尾を持たない単語なので、-n をつけることができません。こんなふうに、目的語だけでも -n がつかない用例はけっこうあります。最初の例文の kiom も、目的語

だけれど対角語尾が付かない例だと考えてはいかがでしょうか。素人考えかもしれませんが、こう解釈するとすっきりします。たとえば Mi trinkis botelon da biero (ビールを一本飲みました) の場合も、実際に飲んだのは中身のビールですが、trinki の目的語は botelo です。この場合、botelo は容器そのものではなく、量の単位だと考えればいいと思います。

話を kiom に戻します。kiom も他の疑問詞同様、ajn との組み合わせで使われることもあります。Kiom ajn mi iris, mi ne trovis la stacion. Sendube mi eraris la vojon.
(どれだけ行っても駅が見つからなかった。まちがいなく道をまちがえたのだ)

形容詞や副詞と組み合わせで使われることもあります。

Kiom longe vi loĝas en Kioto?

(どのくらい長く京都に住んでいますか)

それから、kiom も疑問詞ですから感嘆文にも使えますが、実際の用例にはあまり出会いません。

Pandemio en nova stadio

AIKAWA Setuko (Kioto)

Pandemio de KOVIM-19 (kronviroza malsano de 2019) komenciĝis en la fino de 2019. Nun la malsano ankoraŭ furiozas en la tuta mondo.

Nombro de la infektitoj ondas

La grafikaĵo montras la nombron de la infektitoj en Japanio. Ni povas vidi klarajn ondojn de la pandemio.

Ankaŭ en aliaj landoj okazas similaj ondoj, kvankam la tempo de la pintoj kaj fundoj estas malsamaj.

Ni do ne povas esti trankvila, kiam unu ondo foriras. Tre probable venos la sekva ondo. Mi skribas ĉi tiun manuskripton en la komenco de decembro, do en la fundo post la kvina ondo. Nun nove trovataj infektitoj nombras kelkdek en tago. Se daŭros tia stato, KOVIM-19 ne estos tre terura malsano. Sed oni povas antaŭvidi, ke la sesa ondo estos ne evitebla.

Tipoj de la nova kronviruso

La viruso, kiu kaŭzas malsanon KOVIM-19, havas multajn tipojn. En la komenco oni nomis ilin laŭ la nomo de loko, kie la tipo unuafoje estis trovita. Sed laŭ rekomendo de MOS (Monda Organizo pri Sano, angle WHO) nun oni nomas la tipojn donante literon de greka alfabeto: alfa, beta, gamma... La kvinan ondon en Japanio ĉefe kaŭzis la tipo delta. En la nuna momento la plej nova tipo

estas nomata omikron. Ĝi estas la dekkvina litero en la greka alfabeto, sed la tipo ne estas dekkvina, ĉar plurajn literojn oni intence ne prenis. La kialo ne estas klarigita, sed iuj diras, ke la prononco de la literoj samas kiel ofta persona nomo aŭ ofte uzata anglingva vorto.

Vakcino

Vakcino kontraŭ KOVIM-19 estis pretigita en senprecedenca rapideco. Danke al tekniko pri mesaĝa RNA (ribonuklea acido) helpis rapidigon de produktado de vakcino. De antaŭe fakuloj esploris pri mRNA-vakcino, kaj nun ili povis utiligi ĝin en praktiko.


En Japanio pli ol 70 procentoj el la popolo estis jam vakcinitaj.

Aliflanke okazas "trapasa infektigo", nome infektigo post vakcino. La efiko de vakcino ne povas esti perfekta. Iu diras, ke vakcino kontraŭ KOVIM-19 estas kvazaŭ sekuriga bendo, kiu fiksas veturanton de aŭto. Per sekuriga bendo oni ne povas eviti akcidenton, sed per ĝi multe malpliigas damaĝon.

Al mi la komparo ŝajnas ne tre bona, sed iusence trafa. Vakcino ne ĉiam evitigas infektigon, sed multe reduktas damaĝon kaj evitigas morton.

Kiel ni povas trankviliĝi?

Se la nombro de malsanuloj restos sufiĉe malgranda dum certa tempo, ni povos opini, ke la krizo forpasis. Ĉu do la antaŭa vivo revenos? Povas esti, ke oni ĉiam purigos manojn per alkoholo kaj portados buŝkovrilon en Japanio eĉ post la krizo.




吹田でふれあい講演会

吹田エスペラント会は11月3日(水・祝) 13:30～16:00、吹田市文化会館(メイシアター)小ホールでコロナ禍の下における2回目のエスペラントふれあい講演会を開催した。参加者は21名で、前回同様事前申込制で行った。講演題目は「地球環境を守る～水環境とプラスチックごみ～」で、講師は応用生命科学博士の矢吹芳教さん。

1970年公害国会が行われ、それから50年が経過し、裁判などで公害に対しては一定の対応がなされていったが、1990年以降は環境問題が問われ、今でも改善は進んでいない。環境問題は皆が加害者であり被害者になりうるものであり、解決するには時間がかかるという。講師自身も、専門のマイクロプラスチックによる水環境汚染についてさらに研究をされるとのこと。

矢吹さんはプロジェクターを使ってグラフや写真、顕微鏡写真等で説明。休憩後はマイクロプラスチックの測定の中の比重分離の実験を参加者全員で体験するなど、従来とは違ったかたちの興味深い催しとなった。

〔←大畑 賀代子〕



宮崎エスペラント会の近況

宮崎エスペラント会は11月20日(土) 14:00～15:30、久しぶりに例会を持った。会場は宮崎市民活動センターで、参加者は4人。

1. 松本淳会長が11月3日に美術館で行った瑛九展に因んだエスペラント講習会についての報告、及び講習会参加者へのエスペラントへの誘いをどのように行うかについて話し合った。

2. 各地方会から送られてきていた機関紙の回覧。
3. 正会員並びに正会員費に関する規約の改定について話し合った。
4. 今年のザメンホフ祭を12月11日(土) 14時より宮崎市民プラザ4階学習室で開催する。

〔←近藤 方彰〕

富田林で展示

11月13日～14日に金剛公民館まつりが開催され、富田林エスペラント会が展示で参加した。コロナ禍で規模が大幅に縮小され、懸念もあったが、たとえ少人数の来訪者でも展示が目に残ればと思いき、出展を決めた。東京オリンピックの種目のピクトグラムを会員の福原英子さんが色紙を使って作成、種目をエスペラントと日本語で表記したものを掲示した。

〔←藤井 由美子〕



中四国連盟のオンラインミーティング

中四国連盟は、原則として毎月最終日曜日 20:00～21:00、Zoomによるミーティング(研修例会)を行う。問い合わせは連盟事務局木谷奉子さん verdasalono@gmail.com へ。

中四国以外のエスペラントイストの方々も歓迎。

〔←中四国だより〕

源氏物語ミュージアムにエスペラント版寄贈

宇治城陽エスペラント会は10月、宇治市の源氏物語ミュージアムに belmonto さん翻訳の "Rakontaro de Genĝi" を2冊寄贈した。翻訳者自身が提供したもので、同ミュージアム図書室の開架スペースに置かれていて、誰でも手にとることができる。

Vortkruca enigmo

TAKEMORI Hirotoŝi

Vicigu adekvate 7 literojn trovitajn en la kvadratetoj kun stelo. Tiam vi akiros nomon de besto, kiu estas konsiderata kiel simbolo de bonŝanco.

Sendu la trovitan vorton kiel solvon de la enigmo ĝis la 20-a de januaro, paperpoŝte al la oficejo de KLEG, aŭ retpoŝte al <lamovado@gmail.com>

Rimarko: (x) signifas, ke la vorto ne portas finaĵon.

1	2	3	4	5		6	7	8
9		*		7		10		
11					12			
		13			*	14		15
16	17		18	19			20	
21		22		23				
	*							
24				25	26		27	
28				29		*		
30							*	

Horizontale: 1. Miaŭ, miaŭ! /boj, boj! (x) 9. Homoj ~ akvon. (x) 10. La ~ulo amas la ~ulinon. (x) 11. ~oj trejnas sin ĉiutage. (x) 13. ~ aŭskultu! 14. La edzino jam ~ amis sian edzon. 16. en~ejo/el~ejo. (x) 18. Li nun ~ matematikon en universitato. 21. La luno estas kovrita de ~. (x) 23. Libro skribita ~ Esperanto. 24. Birdetoj ~as rizospikojn. (x) 25. ~a nebulo prokrastis la trafikilon. (x) 30. Ŝtuparlifto. (x)

Vertikale: 1. ~a rezisto. (x) 2. Ĉiu avino amas sian ~on. (x) 3. ~ estas gaso konsistanta el tri oksigenatomoj. (x) 4. La foliojn silkraŭpoj manĝas. (x) 5. Mort~a vundito. 6. La verkisto havis la ~on, ke iu provas mortigi lin. (x) 7. Mi ~as vin prunti al mi iom da mono. (x) 8. Vino ~ 2022.01

Francio. 12. La ponto estis forportita de la ~o. (x) 15. Se mi hav~ monon, mi aliĝ~ al kongreso. (x) 17. He, malpura ĉambro! Ĵetu ~on en ~ejon. (x) 19. ~o kun lakto, ~o kun citrono. (x) 20. Pli-malpli ruĝa ŝvelaĵeto, pli-malpli longe videbla sur la haŭto. (x) 22. Longa tabulo apogita sur subteniloj kaj servanta por sidi. (x) 26. Ĉu ~i aŭ ne ~i, tiel staras nun la demando. (x) 27. ~ la tablo estas unu granda pomo. 28. ~ la angulo de la strato ŝi haltis. 29. Ŝi estas pli ~ bela, ŝi estas belega.

La solvo al la novembro enigmo: SALIKO

La ĝustan solvon donis 13 legantoj:

武藤 たつこ,
水渡 篤子,
濱田 國貞,
CA,
Sayuri,
TADA,
本田 照美,
平井 倭佐子,
松川 まきこ,
Grebo,
島津 泰子,
にし のりこ,
Kacu

	Z	A	M	E	N	H	O	F
C	I	K	O	N	I		L	A
N		D		K	I	E	N	
A	G	L		S	E	N		F
I		N	U	L		K	A	
O	B	L		R		Ĉ	A	R
P	R	O	V		F	A	B	O
E		N	E	Ĝ		P	U	N
R	E	G	N		S	O	L	

楽しい作文教室 (125) 成績

10 人の方から応募がありました。() 内は留意事項です。

うん、良いね: AG(④ ŝanĝias), ヒー坊(② laboris), CA(④ 綴り, da), Ivajo, 水渡(② dungistoj)。

良いね: Eiko, Jasuko(③ 数不一致), Haveno(① 時制, ④ sensalajra), Celejo(① 時制, ② 語順), Drako。

キラリ賞: Jasuko(②)。

KLEG 後援会にご協力を

関西エスペラント連盟 (KLEG) は、数十年間会費や購読料の値上げをせずに運営し、機関誌の毎月発行を続けています。主な収入源は会費・購読料、事業収入、図書の売り上げですが、これらだけでは日常的な経費をまかなうのも難しいのが現状です。また 2021 年は、コロナ禍のため行事や例会が各地で中止され、そのために書籍の売り上げも減少しています。

また KLEG では、事務所の維持や加盟ロンドの交流などの日常活動に加え、関西大会や合宿の開催、青年活動の支援やホームページその他による広報、ワン・ワールド・フェスティバルへの参加など、会員を対象にした事業にとどまらず、外に開かれた活動にも取り組んでいます。

これらの活動を支援していただける方に、関西エスペラント連盟後援会 (振替口座 00940-1-26233) へのご寄付をお願いします。

「出版基金」「青年活動支援」「アジア運動支援」など、用途を限定していただくこともできます。

本号に専用の振替用紙 (赤色) を挟み込んでいますのでご利用ください。なお、この振込用紙は後援会専用ですので、会費や書籍代金の送金には、青色の振替用紙をお使いください。

楽しい作文教室 3 月号課題 (1 月 20 日締切)

- ①日本には多くの活火山がある。
- ②その数は 108 で、世界の活火山の 7% を占める。
- ③火山の周りにはたいてい温泉がある。
- ④火山は怖い一方、恵みでもある。

(ヒント) 火山 vulkano、温泉 varmfonto、恵み beno. dum、trovi を調べましょう。

日本語の原文の内容を伝えるには言い換えも必要かもしれません。

送付先:

[郵送] 〒 674-0092 明石市二見町東二見 515-1-811
塚本 猛

[電子メール] c_tak@esperanto.ne.jp

(件名に「作文」の文字を入れてください)

添削は受け付けておりませんのでご了承ください。

Mikspoto

(当欄は敬称略)

★『図書新聞』11 月 27 日号の岡和田晃「〈世界内戦〉下の文芸時評第 81 回」は『エロシエンコのシベリアものがたり』を紹介。「チェスの三手詰め問題」を「北方少数民族に対する国民主義的イデオロギーによる包摂／排除のメカニズムを問う力作」と評し、「エスペラント史に関心がない読者にもおすすめできる一冊になっている」と述べている。

[←染川 隆俊]

★相川拓也著『朴泰遠を読む「植民地で生きることと朝鮮の近代体験」』(「アジアを学ぼう」シリーズ 55、風響社) 中の朝鮮プロレタリア文学に触れた箇所に Korea Artista Proleta Federacio の名称。著者紹介欄では「一般財団法人日本エスペラント協会事務局長」との肩書も。

[←田平 正子]

★中国人戦争被害者の要求を支える京都の会ニュース [すおべい] 64 号に、長谷川テルのここと、テルの記念碑建立運動についての詳しい説明が掲載されている。

[←田平 正子]

KLEG 事務局だより

★KLEG 事務所は、12 月 29 日(水)から 1 月 4 日(火)まで休みます。ご協力をお願いします。

★当誌 La Movado は何月からでも購読できますが、12 月に更新時期を迎える方が一番多いです。個人会費、購読料の切れる方は、更新をよろしくお願ひします。同封している更新用の振替用紙 (黒) をご利用ください。赤い振替用紙は後援会寄附専用です。

KLEG 後援会へのご寄付

(2021 年 11 月、敬称略)






森 亨	5,600 円
手塚 登土雄	600 円
島津 泰子	200 円

ご支援、ありがとうございます。

第108 回日本エスペラント大会

2022 年 9 月 23 日 ~ 25 日

八王子市学園都市センター



★ 新刊・新着 ★

Parnasa gvidlibro 2500円
Kalocsay、Waringhien、Bernardによる詩作の手引きをRuggieroが補訂した第4版。A5判、246p.

La malamiko de Putin 2200円
プーチンの政敵、ロシアの野党指導者ナワリナイとは何者か。毒殺未遂事件の真相は。Kalle Kniiviläによる渾身のレポート。A5判、158p.

エロシェンコのシベリアものがたり 800円
高杉一郎が翻訳したエロシェンコのシベリア体験にもとづく4作品。うち「チェスの三手詰め問題」は訳者没後に原稿が発見され、初出となる。日本エスペラント図書刊行会発行。B6判、112p.

★ 宮本正男の作品 ★

Pri arto kaj morto (第2版) 1000円
山上憶良、大伴家持、世阿弥、千利休、芭蕉、写楽、歌麿、晶子の芸術と生の軌跡を描く。

La obstino 800円
宮本訳の中島敦「山月記」「名人伝」「李陵」。

★ 小西岳の訳で読む日本文学 ★

Noveloj de Akutagawa Ryūnosuke 1000円
「蜘蛛の糸」「蜜柑」「早春」など対訳芥川集。

Kuru, Melos! 350円
太宰治「走れメロス」。原作テキスト付き。

Nokto de la Galaksia Fervojo 1000円
宮沢賢治「銀河鉄道の夜」「ガスコーブドリの伝記」「シグナルとシグナレス」など全5編。

★ 日本エスペラント図書刊行会の本 ★

Lingvo Stilo Formo 1000円
Kalocsayによるエスペラント論集の増補復刻版(原版は1970年ピラート社刊)。「Esperanta vortfarado」「La evoluo de nia poezia lingvo」など。
エスペラント文法の散歩道 [改訂新版] 1000円
小西岳の文法論。「kaj et sed」「laの用法」他。
エスペラント運動を考える - La Movado 誌から 1000円
本誌掲載の論説56編を収録(峰芳隆編)。運動の現在と将来を考えるための好個の一冊。

★ 再入荷 ★

Esperanto: language, literature and community 1400円
Gerda malaperis 1000円
Paralelaj vivoj 2200円
Poŝamiko 850円

ご注文は郵便、ファクス、電子メールで。送料は実費。現品と一緒に請求書を送ります。支払いは振替口座で。

編集ノート



★ p.11に、「狛犬」ならぬ「狛虎」のことを掲載しました。寅年にちなんで、鞍馬寺の狛虎を取材したものです。寅年生まれの編集部員が、けわしい道を歩いて現地に行き、撮影してきました。

発行所:ラ・モバード社 編集:相川節子 発行人:染川隆俊 定価280円 送料63円 1年3800円 送料共本
局:一般社団法人 関西エスペラント連盟内 561-0802 豊中市曽根東町1-11-46-204
電話(06)6841-1928 ファクス専用(06)6841-1955 電子メール:esperanto@kleg.org
振替口座 00960-1-60436 「一般社団法人 関西エスペラント連盟」 ホームページ:http://www.kleg.org
九州支局:九州エスペラント連盟内 859-0407 長崎県諫早市多良見町シーサイド2-190 盛脇保昌方 電話(0957)43-4352
中国四国支局:中国四国エスペラント連盟内771-0371 徳島県鳴門市北灘町櫛木字観音面14-1 木谷幸子方 電話(088)688-1098